# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo marto 2015**

## VIZITIS NIN



La 16-an de februaro vizitis la sidejon de MEL niaj amikoj el Valadolido, Luis Hernández kaj Rafaela Urueña. Ili babiladis kun ni dum la kutima semajna kunveno de la anoj.

Kiel ni anoncis en pasinta numero, vizitis nian urbon dum unu semajno la internacia familio de István Ertl kaj Fabienne Berthelot-Ertl, kaj iliaj tri gefiloj. Ili renkontis plurajn esperantistojn diverstage, kaj la 17-an István prelegis en la sidejo pri la diversaj hazardaĵoj de sia esperantista vivo. Ĉeestis pli ol 20 madridanoj, kun vigla interparolo. Sur la foto, István kun Jorge Camacho, kiu faris la prezentadon.

## VIZITO AL REZIDEJO DE STUDENTOJ

MEL organizis grupan viziton al la fama antikva kultura centro Residencia de Estudiantes, la 25an de februaro je la 16:30. Oni konatiĝis kun la konstruaĵo kaj ties historio, kaj oni povis spekti ekspozicion pri ĝi. Sur la foto la esperantistaj partoprenantoj en la vizito.




## PRELEGO EN LA KLUBO DE AMIKOJ DE UNESKO

La prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, prelegos en la sidejo de la Klubo de Amikoj de Unesko (CAUM), pri la nuno kaj estonto de Esperanto. La parolado okazos la 17-an de marto je la 7-a vespere kaj la adreso estas strato Atocha 20, 1a (atentu, temas pri nova adreso)

**nia voĉo** **marto 2015**

## MALGRANDA JUVELO NUN EKSPOZICIATA EN LA NACIA BIBLIOTEKO




Ĝis la 3-a de majo oni povas viziti en la Nacia Biblioteko de Madrido ekspozicion pri kolektemo kun rilato al Cervantes: *"Coleccionismo cervantino en la BNE: del doctor Thebussem al fondo Sedó"*. Inter ĝiaj eroj troviĝas la manuskripto de la unua malneto de la traduko de "La malprudenta scivolulo", fare de Luis Hernández Lahuerta, kun liaj propraj desegnoj, de li donacita al la kolektemulo Juan Sedó.

La ekspozicio estas la unua agado de la celebrado de la kvara datreveno de la dua parto de Kiĥoto, kiun oni pretigas por tiu ĉi jaro, kaj al kiu ankaŭ HEF planas kontribui.

## VIZITOS NIN

De antaŭ tri semajnoj troviĝas inter ni Lisha, el Ĉinio, kiu alvenis por studi la hispanan, kaj kiu post vizito al la sidejo intencas daŭrigi la kontaktojn kun la madridaj samideanoj.

Alvenis letero anoncanta viziton de tri-homa familio en junio, la emeritula paro Sylvie kaj Pierre, kun ilia dekjaraĝa nepo Leo, kiu lernas la hispanan. Ili jam rezervis biletojn per aviadilo de la 15a ĝis la 22a de junio kaj ĉefe dezirus viziti la muzeon Prado. Ili serĉas eblecon esti loĝigitaj en la centro de Madrido. La kontakt-adreso estas: sylvie.plantier30@gmail.com

## PLIA MATERIALO EN BITOTEKO

Kun permeso de Miguel Gutiérrez Adúriz, HEF aperigis en Bitoteko du dokumentojn rilatajn al lia lernolibro publikigita en 1995.

- *Clave de los ejercicios* (ekzerco-solvoj): http://hdl.handle.net/11013/4495
- Sonregistro de la legaĵoj: http://hdl.handle.net/11013/4487

Ĉiuj uzintoj, -antoj kaj -ontoj de tiu bonega lernolibro disponas nun ĉi helpilojn en la reto.

## HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Pli ol 50 homoj jam aliĝis al la 74-a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos post du monatoj en la urbo Cullera. Memoru ke la detaloj troviĝas en la retejo http://esperantoval.org/cullera2015/, kie ankaŭ eblas trovi la aliĝilon al la renkontiĝo.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30.

La unuasabata renkonto okazos la 7-an de marto, je la 6-a vespere en la tre populara drinkejo, Sidrería El Tigre, strato Infantas, 30 (atentu la numeron, ĉar estas aliaj en la sama strato), kie ni jam rendevuis en novembro kaj decembro.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/,

kaj la Fejsbukan forumon de MEL http://on.fb.me/17Ocl2l aŭ la pli ĝeneralan https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com